





**FLANDRA  
ESPERANTISTO**

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA  
**ESPERANTO  
MOVADO**

Oficiala Organo  
de 

Flandra   
Ligo   
Esperantista 



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belga

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

Sekve al la malvaloriĝo de la belga valuto, la prezo de ĉiuj libroj eldonitaj eksterlande, treege plialtiĝis.

Pro tiu kaŭzo ni provizore ne renovigos la stokon de F. E. I. kaj reaĉetos nur laŭproporcie de la ricevitaj mendoj.

La varoj de kiuj restas provizo, estas vendataj je la originala prezo, ĝis elĉerpiĝo.

La novaj prezoj estos kalkulataj kiel eble plej favore; sekve ni estas devigataj provizore ne plu konsenti rabaton al la grupoj, sed anstataŭe la sendkostoj ne devas esti pagataj, escepte por mendoj de malpli ol 10 frankoj.

## EL LA PREZARO:

Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	Fr.	7,50	broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor		10,—	»
La Du Amatinoj — de Musset		7,50	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf		5,—	»
Dialogoj kaj Komediotoj — E. Dahl		3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto		4,—	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz		17,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz		17,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)		12,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck		5,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)		2,—	»
Schidlof Zakwoordenboek		22,50	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)		15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)		10,—	»
Flageto por biciklo		6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto		2,—	»

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Vedra stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Glumarkoj « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

# Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate



Redakcia-  
adreso:  
Houwerstraat, 22  
Antwerpen.  
Tel. : 277.51.



Administranto :  
Gerard Debrouwere  
Magdalenastr. 29  
Kortrijk  
Tel. : 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belga  
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.  
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-  
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,  
A. LODEMA kaj aliaj.

## Flandra Ligo Esperantista

*Generala Kunsido en Antwerpen la 22n de Septembro.*

En la ejo de la Antverpena Grupo « La REKTA VOJO » St. Ja-  
cobsmarkt, 98, Antwerpen, okazos la Liga kunsido. Gi malfermiĝos  
je la 10.30a matene akurate.

### TAGORDO :

1. Raporto de la antaŭa kunveno ;
2. Financa raporto de la L. K. K. de la 6a kongreso ;
3. Pri la ekzamenoj A kaj B. ;
4. Propagando (S.ro Lenaers) ;
5. Propono de S.ro J. Telling (Nederlando) pri Tutnederlanda Es-  
peranto Ligo.
6. Reelekto de la Estraro.
7. Difino de la kongresloko por nia 7a.
8. La situacio de « Flandra Esperantisto ».

Je la 13a posttagmeze la kunvenantoj iros al restoracio por tag-  
manĝi. (Partoprenantoj al la tagmanĝo bonvolu sin anonci almenaŭ  
3 tagojn antaŭe skribe ĉe la redakcio; prezo de la tagmanĝo estos  
proksimume 8 aŭ 10 frankoj).

Je la 14a horo ekzakte la kunvenantoj trame aŭ aŭtobuse iros  
al la tombejo de Berchem, kie je la 14.30a horo estos inaŭgurata la  
tomboŝtono de Juul Karnas. (Nepartoprenantoj al la kunveno aŭ  
tagmanĝo bonvolu sin renkonti apud la enirejo de la tombejo je la  
14.30a).

Post la inaŭguro, se necese, daŭrigo de la kunsido.

LA ESTRARO.

## «La Pirato» - kaj ni

La funkcio de redaktoro de Esperanta gazeto ne estas enviinda, precipe se ĝi ne estas pagata, kiel la nia. Tamen, rekompence, ni havas la okazon legi ĉiujn kaj ĉiajn Esp. gazetojn de la tuta mondo, ĉar « Flandra Esperantisto » ankaŭ estas sendata al preskaŭ ĉiuj redakciojn de la mondo. Okazas, ke tri, aŭ pli Esp. gazetojn ni trovas en nia leterkesto samtempe.

Kompreneble, ni legas ĉiujn tiujn gazetojn, ĉu supraĵe, ĉu pli akurate, laŭ nia tempo, humoro kaj emo. Sed unu el ili, ni post ricevo tuj malfermas kaj kun scivoleco legas. Ĝi estas « La Pirato ». Ĝi venas el la urbo de la « spritaj geniuloj », el Parizo. Ĝi « kaperas » ĉiunonate; kaj ĝiaj redaktoroj : la kapitano, la leŭtenantoj, kaj la antaŭ-la-masto-vivantaj — ordinaraĵoj — ŝipanoj superas unu la alian, verkante artikolojn, kiuj alportas veran ĝojon al la atentema leganto (senpaga reklamo !). La redaktoro kaj la kunlaborantoj nomiĝas : Raimond Schwarz ; « La deĵoranta pirato » ; Sala Fumal, (virino) Ale Ben Tarip, Jules Laribois, kaj tiel plu.

Sed, ni devas konfesi, ke ju pli ni, dum nia legado, alproksimiĝas al la mezo de la 16 paĝa libreto, des pli ni maltrankviliĝas ... ĉar tie troviĝas la rubriko :

« PIRATE TRA LA GAZETARO ». — Tiu rubriko, kiu ne estas subskribata, enhavas gramatikajn, stilajn kaj aliajn erarojn, troviĝantajn en la Esp. gazetaro (esceptite de « La Pirato » mem.). Senkompate la piratoj presigas tiujn erarojn kaj provizas ilin de siaj ironiaj kaj sarkasmaj rimarkoj. Ekzemple en « La Pirato » de julio-aŭgusto ni trovis :

NIA GAZETO (Junio). — « Maljunaj kampanoj rigardadis Marieton, el sub la ansoj de siaj korbegoj aŭ el sur siaj pakegoj kuŝantaj sur iliaj genuoj, kiuj entenis la aĉetaĵojn faritajn en Valencia. »

*Kiam oni havas tiel praktikajn genuojn, kiuj povas enteni la aĉetaĵojn, oni ja ne bezonas korbojn !*

Facile vi, karaj gelegantoj, do povas kompreni, ke ni time traserĉas la nomitan rubrikon, ĉu la piratoj eble ankaŭ piratis en « FL. ESP. ». Nu, kelkfoje ili faris tion, sed la rabaĵo nur estis malgrasa ! Kaj post legado de ĉiu nova Pirato, ni pli fiere kompilis novan numeron de « FL. ESP. ».

Sed ho, ve ! En la jam nomitan numeron ni tre trankvile tra legis denove la rubrikon « Pirate tra la Gazetaro » kiam ni subite trovis ion, kio fluigis la sangon al nia kapo ! Ankorau nun, verkante ĉi tiun artikolon, nia skribilo, pro honto treme moviĝas sur la papero ! Jen legu, kia stultaĵo ni iam verkis :

FLANDRA ESPERANTISTO (Julio). — El raporto pri la 6-a Flandra Kongreso : « Ni ne volas lacigi la gelegantojn per la redono de la paroladoj de S-roj v. d. Dooren kaj Calloens, eĉ ne fragmente, cetere por tio mankas loko. »

Kaj jen la « komento » de « La Pirato » :

*Kaj nun S-roj v. d. Dooren kaj Calloens scias, kion oni pensas pri iliaj belaj paroladoj !*

Kial S.ro Calloens, la prezidanto de « FL. ESP. » ankoraŭ ne eksigis nin de nia funkcio ? Kaj kial la korekta kaj (laŭ nia impresio) iom aristokrata S.ro v. d. Dooren ne batis per sia ganto nian vizaĝon kaj sendis siajn sekundantojn ? Ĉar certe ĝi estas ofendo, kiu nur per duelo povas esti rehonorigata. Image ni elektis jam la revolveron kiel duelarmilon, ĉar iam ni estis Majstro-Pafisto je tiu armilo. Sed ĉar la elekto de la duelarmiloj apartenas al la ofendita partio, ni timas ke S.ro v. d. Dooren elektos la spadon, kaj tiam nia vivo (la privata kaj la redaktora) ne pli valoras eĉ unu belgan frankon ...

Kompreneble ni tute ne celis per nia artikolo malpliigi la valoron de la paroladojn de la nomitaj sinjoroj. La plejmulto de la legentaro mem aŭskultis la sinjorojn, kaj ni ne volis lacigi ilin per ripetado.

Tamen « La Pirato » ne estis kontenta per tiu, nun grasa, rabaĵo, ĝi piratis ankoraŭ pli :

SAMLOKE. — El raporto de la Flandrema Grupo Esperantista, Antwerpen : « La, por la kongreso, starigita ŝparkaso donis bonan rezulton. Ĝi ebligis al ni iri al Brusel kvardekope. Neniam ni forgesos la agrablajn kongrestagojn, kaj poste, ni ankoraŭ ofte murmuros : Estingu la kandelon, Marie ! »

*Ĉu ni rajtas el tiu ĉi raporto konkludi, ke ankoraŭ ne ekzistas elektra lumo en Bruselaj hoteloj ?*

Ni informas « La Piraton » ke « Estingu la kandelon Marie » estas la lasta linio de la refreno de gaja kantaĵo kiun la petolaj geanoj de la Flandrema Grupo aŭdis dum la kongrestagoj « ie » en Brusel.

Kaj ni, fine, dankas « La Piraton » ĉar ĝi donis al ni subjekton por artikolo, sen kiu « FL. ESP. » tute certe estus aperinta kun kelkaj blankaj paĝoj dum tiu-ci kukuma periodo ! A. LODEMA.

(parte nekorektita)

## **Internacia menulingvo**

El « De Nieuwe Gazet » ni tradukas :

Al multaj estas malagrabla, kiam, dum vojaĝo en eksterlando, envidante en hotelo la menuon, konstati ke tiu menuo aspektas malfacile solveblan kruevortenigmon. Eĉ se oni scipovas pli malpli la lingvon de la vizitata lando, tamen rilate al la gastronomio, ĉiu lando havas tiom da strangaj vortoj kaj esprimoj, ke por eksterlandano plurfoje estas neeble kompreni ĝin.

Por finigi tian misan situacion, kiu ekzistas en preskaŭ ĉiuj landoj, la Pariza hotelisto, S.ro Edmond Polly kompilis internacian menukarton — lingvon, de kiu li esperas, ke ĝi okazigos grandan ŝanĝon en la ĝisnuna situacio. La nova lingvo de Edmond Polly konsistas el 500 vortoj per kies helpo oni, same kiel per internacia telegramkodo, en ĉiuj landoj de la mondo, ĉiam kun la plej granda certeco la samajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn de la antaŭmanĝaĵo ĝis la deserto povas mendi. Ĉiuj afer- kaj plezurvojaĝantoj, kiuj konas ĉi-tiujn 500 internaciajn menukartvortojn estonte spertos, ke ili en hoteloj aŭ restoracioj, ankaŭ en la plej ekzotikaj landoj, tre facile povas mendi bifstekon kaj terpomojn aŭ duonan kokineton.

Ni opinias ke S.ro Polly ne estas membro de « La Piratoj » aŭ de la Pariza grupo « La Verda Kato ».

# Leteroj el Esperantujo

## X.

AMIKO LA KOKO,

Tiu-ĉi letero mi skribas al vi reveninte el regiono kiun oni povas nomi « Malgrand-Esperantujo ». Ĝi situas en la malgranda banloko ĉe la Flandra marbordo Oostduinkerke, kaj ĝia fokuso estas la hotelo de S.ro P. Benoit, franca samideano. Dunsomere multaj gesamideanoj diversnaciaj tie renkontiĝas kaj ĝojkrietoj aŭdiĝas ĉiam, kiam denove por la dua aŭ tria fojo unu esperantisto revidas la alian.

Estas jam la tria fojo ke mi, kune kun mia vulpino kaj kelkaj vulpidoj pasigis tie mian libertempon kaj krom la fideluloj de ĉiu jaro, mi ĉiam renkontis aliajn. Sed plej grandan ĝojon mi sentis, kiam mi konstatis ke la semo, pasintan jaron semita de S.ro Bas el Brussel fruktiĝis !

Tiam (pasintan jaron), en la mangoĉambro ni sidis al la sama tablo, kune kun franca familio el Rysel. Konversacio estis preskaŭ tute neebla, ĉar vi scias ke miaj ruzajoj superas mian konon de la franca lingvo. Tamen, ili interesigis por Esperanto kaj S.ro Bas instruis al ili, (patro, patrino, filo kaj bofilino) la unuajn elementojn de nia lingvo en ilia marborda dometo.

« Se ni revenos la sekvontan jaron, ni bonvenigos vin en Esperanto ! estis iliaj lastaj vortoj dum la disiro. Mi akceptis la promeson iom skeptike... »

Kaj nunjare mi revidis ilin. Enirante la hotelon por tagmanĝi mi subite aŭdis : Ho ! ha ! he ! sinjoro, kiel vi fartas ? kaj mi rekonis la francan familion el Rysel. Ĉiuj, krom la patrino, bone parolis kaj komprenis Esperanton ! Pro nura ĝojo tiun tagmezon mi mendis botelon da bonega franca vino anstataŭ akvon. Ĉeestis ankaŭ multaj samideanoj el Antwerpen, Francujo, kaj unu el Nederlando. Ankaŭ mi spertis ke la senpera propagando, de homo al homo plej bone efikas, ĉar almenaŭ 10 personoj, ne-Esperantistoj promesis lerni Esperanton tuj post la libertempo. Kiam ni foriris, niajn valizojn portis al la tramo la bulgara servisto de S.ro Benoit, kiu estas ankaŭ fervora kaj ĝentila samideano.

Sendube vi jam legis pri la malpermeso de Esperanto en la germanaj lernejoj. Post tiu malpermeso aperis diversaj komunikoj, ke la germana registraro pro tio ne estas kontraŭ Esp. sed ĝi ne volas subteni ĝin. Do, Esperanto estas nur tolerata tie, ĝis...

Mi opinias, ke kiam la lasta judo estas elpelita aŭ... murdita, oni tie ekstermos eĉ la lastan paperpecon enhavantan Esp. vorton... Mi pensas ke « Heroldo de Esperanto » tiam estos devigata transloĝi al Rotterdam, ĉar oni ne devas esperi ke Genève diros « venu tien ĉi, vi estos bonvena ». Por tio, bedaŭrinde la tempo ankoraŭ ne estas matura ĉe U. E. A. !

De la 9a ĝis la 16a de aŭgusto okazis la dua kongreso de I.P.E. (Internaciaj Proletaj Esperantistoj). Mi ĉeestis la publikan kunvenon sabaton vespere. Inter la ĉeestantaro mi rekonis diversajn Antwerpenajn Esp. istoj, ne I.P.E. anojn, kiuj ĉu pro scivoleco, ĉu pro simpatio aŭskultis la diversajn paroladantojn.

Mi klopodis kolekti impresojn por skribi ilin al vi. Malgraŭ la partopreno de sufiĉe multaj eksterlandanoj, oni tamen komencigis, laŭ Antverpena kutimo, la kunvenon je la 21a anstataŭ je la 20a horo.

Diversaj reprezentantoj de socialistaj, komunistaj, ateistaj unuigoj laŭvice paroladis. Ankaŭ reprezentantino de la Ligo de virinoj kontraŭ milito kaj faŝismo. Preskaŭ ĉiuj ne sciis eĉ unu vorton de nia lingvo, sed ili kaptis la okazon por konvinki la kongresanaron ke ili devas uzi ilian konon de Esp. kiel armilon kontraŭ kapitalismo, milito, faŝismo, religio kaj kontraŭ ankoraŭ multaj aliaj aferoj. Mi demandis al mi kial ili mem ne lernis Esp. por fari sian propagandon? Preskaŭ ĉiuj paroladoj okazis en la Nederlanda lingvo kaj nur unu, du malplej interesajn oni tradukis. Nur unu parolado en ne reproĉinda Esp. lingvo mi aŭdis, nome de kamarado Karlo Moro, hungaro. Li pretendis ke nur la I.P.E. anoj *uzas* la lingvon; la aliaj, (do precipe la tiel nomataj neŭtraluloj) nur ekzercas Esp. por amuzo; ili « sportas » kun Esp.!

Mia ĝenerala impresoj? Ho amiko! Antaŭ 35 jaroj mi ankaŭ estis, aŭ almenaŭ mi imagis esti socialista. La tiamaĵaj paroladoj igis hategi mian koron kaj mi tremis pro emocio! Kaj nun? La paroladoj estas tute la samaj kiel antaŭ 35 jaroj, nur kelkaj novaj vortoj aŭdiĝas: faŝismo, venenbomboj, gazbomboj, unuecfrente. Sovetio estas la paradizo kaj la cetero de nia terglobo la infero.

Kaj mi certigas al vi, ke malgraŭ I. P. E., S. A. T., U. E. A., I.K.U.E. kaj aliaj organizaĵoj, la homaro marŝos kontraŭ la malamikon, tuj kiam komenciĝos la nova « lasta » mondmilito. Ho, ve!

Hazarde kaj pro malagrabra kaŭzo mi ĉestis kunvenon de la Flandrema Grupo Esperantista. Mi trovis tie societon konsistantan el pli ol 40 Esperantistoj, tiel diversnacian, kiel nur tre malofte okazos en grupaj kunvenoj. Estis, krom la membroj de la grupo, nederlandanoj, francoj, angloj, skotoj, germano, rumeno, hungaro kaj eble ankoraŭ alinacianoj. Ĉiuj partoprenis la I.P.E. kongreson. pri kiu mi jam skribis en ĉi-tiu sama leterejo. Kaj nun mi aŭdis pli da esperanto-paroladetoj, ol dum la publika I.P.E. kunveno, nederlandlingvaj paroladoj. Evidentis, ke pli ol unu el la gastoj sciis ke ekzistas « Flandra Movado » kaj kelkaj donis honajn konsilojn rilate al la flandra movado. La rumeno pledis por pli intensa kunlaborado inter la flandraj kaj valonaj laboristoj, por ke la flandroj per la helpe de la valonaj laboristoj akiru la plenumon de siaj soniroj! La bonulo ne sciis, ke la valona parto de la « Belgische Werklieden Partij » (Belga Laborista Partio) subpremas ĉiujn dezirojn speciale flandraj kaj ankoraŭ malpli ke flandra socialista ministro de instruado ne sukcesis respektigi jam ekzistantajn leĝojn, favoraj al la flandroj!

La germano kompreneble pledis kontraŭ la faŝismo. Cie, kie la faŝismo ekĝermas oni devas klopodi ĝin subpremi, ekstermi, do ankaŭ se ĝi aperas en la flandra movado! Li ne sciis ke tre aktiva parto de la flandra movado estas gvidata de faŝistoj! La nederlandano rakontis ke parolante la unuan fojon kun flandrino ili ne novis kompreni unu la alian per la nederlanda lingvo! « Feliĉe », ŝi diris, « ekzistas Esperanto! »

Kvankam sufiĉe bonedukitaj flandro kaj nederlandano sin tre bone povas kompreni per la nederlanda lingvo, mi tamen devis pensi al la 3a flandra kongreso en Kortryk en la jaro 1932. Dum vizito al muzeo iu Kortrykano funkciis kiel gvidanto klarigante en flandra lingvo. Sed lia lingvo estis al mi tiel nekomprenebla ke mi demandis al li prefere uzi Esperanton. Kaj en belsona Esperanto li daŭrigis.

La 7an de aŭgusto komenciĝis en Romo la 27a internacia kongreso de Esperanto. Ĝi estas « migranta kongreso » ĉar ĝi okazas en diversaj urboj kaj eĉ sur ŝipo vojaĝante al la Afrika marbordo. Apartenas pli ol 1500 Esperantistoj el 35 landoj. La redaktoro de « Heroldo », S-ro Jung dediĉis ĉef-artikolon al sia vajaĝo tien kaj al la malferma kunsido. Ĉar laŭ mia scio, neniu membro de FL.L.E. partoprenas, la redakcio de FL. E. sendube ĉerpos el « Heroldo » por sciigi al ili la plej ĉefajn okazintaĵojn.

Ĉiam la via.

R. LA VULPO.

## Blua amlegendo

En tiu tempo malriĉa knabo vagis laŭlonge verdaj vojoj kaj murmurantaj riveretoj. Li ĝisvivis tiun aĝon, kiu vekas en la animo tiun deziron al io nova granda, io entuziasmiga. La vivo ŝajnas malplena ; iu miraklo devas okazi, kaj, ĉu oni estu princo, ĉu malriĉulo, la jena espero regas ĉion alian.

En silento li aŭskultis la poemojn senvortajn, kiuj suzuris en lia kapo.

Sed iun tagon li subite vidis, meze de rozogardeno, mirindan knabinon, kiu kvazaŭ svebis tra la ruĝa rozoriĉeco. Ŝi portis ĉielbluan, longan mantelon, super kiu radiis ŝia abunda, bruna hararo.

Strange ! Kiel li ne vidis ŝin antaŭ kelkaj momentoj ? Li tamen rigardis en la saman direkton. Nenia dubo : estis amfeino, kiu subite aperis el nevidebla mondo. Kvazaŭ ŝi estus magneto, li antaŭeniris, tamen iom timeme.

Siaj okuloj brilis kiel bluj steletoj en printempa nokto. Ili ridante alrigardis lin, kaj penetris en la liajn profunde... tiel profunde, ke li sentis ion kiel balzamon kiu superfluas sian koron. Tio estis la amo, la longtempe atendita !

La internaj poemoj prenis vortojn, dolĉajn kiel sukero: sed la timema knabo ne kuraĝis esprimi ilin al la belulino, kiu nur per ĝardenbarilo estis malproksimigita de li.

Ankaŭ li ridetis, sed kun esprimo de sklaveco en la okuloj.

— Belan matenon, ĉu ne, Fraŭlino ?

— Efektive, Sinjoro... Ĉu vi ŝatas promenadi ?

— Tre... tre... Kiam mi vidas la sunon tiel radiantan sur la ĉielo, mi volus esti riĉulo por ĉiam vagadi tra la naturo. Nu, malŝiĉe tio ne estas, sed mi profitas ĉiun liberan horon.



Li mem miris pri sia vortalfluo kaj tamen tio nur kaŝis la pli dolĉajn esprimojn, kiujn li enkarcerigis en sia koro.

— Estas bona ideo, — respondis la ĉarma knabino. — La naturo ja estas tiel belega. Mi ankaŭ ŝatas viziti la florgardenon, tiujn rozojn... ruĝajn...

— ... Kiel la amo ! — interrompis la knabo ŝercante.

Pli arde ŝi alrigardis lin.

— Ĉu vi volas belan rozon ?

— Ho, certe, Fraŭlino.

Kaj per siaj etaj manoj la belulino deŝiris ĉarman, fajroruĝan floron, kiun ŝi donacis al li.

— Mi dankas vin, Fraŭlino, — li flustris. — Mi ja tre ŝatas rozojn, precipe la ruĝajn.

— Ho, — ŝi ridis.

— Kaj nun, bonan tagon, aminda Fraŭlino; ĝis la revido!...

Li etendis la manon kaj la knabino forte premis ĝin.

— Bonan tagon !

Li ne kuraĝis resti pli longtempe, kaj post nova rigardo li foriris. Ŝi forŝvebis tra la rozejo kaj kun amoflamo en la okuloj li vidis ŝin foriri al la kasteleto, kie ŝi sendube loĝas, meze de la ĝardeno.

\* \* \*

Depost tiu momento la fraŭlo nur havis unu celon, unu deziron : revidi la knabinon kun la blua mantelo.

Liaj promenadoj similis cirkloradioj, kiuj finiĝas je la sama centra punkto : la rozoĝardeno. La ideo pri la unua renkonto pleniĝis lian kapon, idealiĝis en lia spirito. La ricevitan rozon li ĵaluze konservis en akvo kaj kiam ĝi estis velkiĝinta, li metis la petalojn inter la paĝoj de antikva biblio.

Poste li pluraj fojoj vane preterpasis la rozejon ; li tiam malespere fiksas la okulojn je la kasteleto, kiu restis fermita... Tiam, la koro plena je ĉagreno, li rehejmeniris por ĉiam denove reveni pro freneza deziro. Alifoje li estis pli feliĉa. De malproksime li rekonis la bluan mantelon, kiu lin altiris senvole. Kiam li renkontis ŝin, ŝi ĉiam gaie kaj aminde ridis kaj tiu sekundo estis por li kiel varma sunradio, kiu ĝojigis lian tutan tagon.

— Mia suneto ! — li tiam flustris en ekstazo.

Okazis ankaŭ ke li kuraĝis haltigi ŝin por preparoli ĉu la veteron, ĉu la rozokulturon. Dum kelkaj minutoj ili tiam interbabilis kaj denove disiris, sen ke li elparolis la vortojn delonge jam brulantajn sur siaj lipoj.

La blua feino iĝis por li amikino fidela, kiu ankaŭ ŝiaflanke ŝajnis ĝoji pri ilia kamaradeco ; kaj lia spirito trinkis la fortan, profundan rigardon el ŝiaj okuloj, kiel alkoholemulo kiu ĝuas en ebrio. (Li tamen estis abstinentulo).

Iun tagon li vidis la bluan mantelon inter aro da riĉevestitaj personoj : fraŭloj kaj fraŭlinoj. Li estis tiel malproksima ke li preskaŭ ne kapablis rekonii la reĝinon de sia koro; tamen la ĉielblua mantelo ne permesis iun dubon. Li emociiĝis terure kiam li rimarkis ke bela, brunvestita fraŭlo (ŝajnis al li princo) kun brilanta glavo ĉe la lumbozono, marŝis flanke de lia « suneto » kaj eĉ donis la

brakon al ŝi. Ŝi tamen iam diris ne esti fianĉiniĝinta. Eble estis frato, kuzo... Dolora enigmo, kiu trafis lin en la koro tiel forte, kvazaŭ la princo estus frapinta lin per sia brilanta glavo.

La malfeliĉa knabo ne kuraĝis antaŭeniri kaj kun larmoj en la okuloj li forvadis en alian direkton. Kiom stulta li estis, ami feino, principinon neatingeblan de li. Tamen tiu okazintaĵo estis kiel oleo sur fajro... Li ne plu sentis sian kapon; lia spirito similis maltrankvila maro. Jes, li devis scii la veron, kiom ajn malesperiga ĝi estu. Li laboris, manĝis instinkte; lia vivo fariĝis iu supernatura, supersentata, mistika, sed kiom ĉagrena! Car, kvazaŭ por pliarĝigi lian amon, por suferigi lin ankaŭ pli kruele, la bela knabino restis nealproksimebla al li. Ĉiam, kiam li renkontis ŝin, ŝi estis akompanata de unu aŭ alia persono. Malgraŭ tio, ŝia saluto tamen restis tiel amika; ŝia rideto tiel aminda kiel antaŭe; la enigmo pligrandiĝis.

Kun detektiva sperto (kvankam tia policano tiam ne ankoraŭ estis konata en la mondo) li klopodis enpenetri la vivon de sia « diino ». Li eksciis ke ĉiun ĵaŭdon vespere (la vespero de la geamantoj, ĉu ne?) ŝi sole hejmeniris de iu kunveno. Li bone pristudis sian planon, kiel kavaliro el antikvaj tempoj, kiu intencis forrabi sian amatinon kaj pacience li atendadis apud la rozogardeno, super kiu la luno lumis falĉilforma kiel sur Turka flago. Li sentis sin kiel heroo el orienta mil-kaj-unu-nokta fabelo... Kavaliro! Turka luno! Feino! Kion vi deziras plu, mia karulineto?!

Jen, tra la malhelo alvenas iu ombro... Ho! Blue la lunlumo falas sur bluan mantelon. Estas ŝi!

Post tiom da semajnoj li petus klarigon de la enigmo...

— Bonan vesperon, malsaĝa Knabino, — li salutis, sed tiel aminde, tiel amplene.

Sajne la blua feino ne miris, kaj malgraŭ pala nokta lumo, li sentis kiel ĉiam la ekbrulon de ŝiaj tiel gajaj kaj fajraj okuloj...

— Ĉu ankoraŭ promenanta? — ŝi ridis.

— Jes... Estas ja tiel longtempe ke mi ne plu havis okazon paroli kun vi...

— Jam tiel longtempe? — ŝi ŝerce ripetis.

— Kvazaŭ eterne, bela Fraŭlino; — kaj pli timeme li daŭrigis: Antaŭ kelkaj semajnoj mi vidis vin akompanatan de geamikoj: kaj mi miris pri fraŭlo kin promenis flanke de vi, mi eĉ dirus « kontraŭ » vi... Ĉu eble frato?

— Frato? — ŝi ripetis. — Tute ne... Estis amiko mia... Jes, jes, ... kamarado.

Ŝi ne diris « fianĉo » nek « amanto ». Ĉu ankaŭ li estis konsiderata kiel amiko, nur kiel amiko?...

— Ho, estis amiko, li daŭrigis kun speciala akcento, kaj ŝi ree ŝerce ridetis.

Sed je tiu momento ĵaluzeco subite plenigis lian tutan estaĵon. Li ne pli longe povis memregi sin.

— Ho, blua anĝelo, mi amas vin, — li ekkriis kaj li klopodis ĉirkaŭbraki ŝin kaj kisi ŝian ĉarman buŝeton.

Kio tamen okazis? El inter liaj brakoj la blua feino subite malaperis, kiel fumo el kamentubo kaj nur restis « nenio ».

Timigite li ĉirkaŭrigardis. La luno kviete brilis super la pejzaĝo; sed la rozejo estis malaperinta kaj la kasteleto ankaŭ. Al li restis nur malespero kaj ploroj pri rompitaĵoj iluzioj, pri foraj ĥimeroj. Je la momento de lia venko li refalis en abismon...

\* \* \*

Kredu aŭ ne kredu! La amlegendoj (ne nur la bluaj!) estis, estas kaj estos ĉiam. Ili similas al la historio: daŭre ili sin ripetis sub novaj formoj, eble malpli magiaj.

POL VARENS.

## LA MALSAGULO KAJ LA MILITO

Malsagulo staras flanke de la vojo kaj vidas preterpasi arme-korpuson kun lancoj kaj pafarmiloj.

La malsagulo: De kie tiuj viroj venas?

La popolo: El la paco.

La malsagulo: Kien ili iras?

La popolo: Al la milito.

La malsagulo: Kion ili faros en tiu milito?

La popolo: Ili mortigos la malamikojn kaj bruligos la urbojn.

La malsagulo: Kial ili faros tion?

La popolo: Por fondi la pacon.

La malsagulo diras ke li ne komprenas: viroj venas el la paco kaj iras al la milito por fondi pacon.

Kial ili ne restas en la paco? Sed estas malsagulo, kaj tial li kredeble neniam komprenos tion.

DELARBARO.

## LA BONEDUKITA HOMO

Bonedukito sekvas kodon,

Ĉar kiu pekis kontraŭ ĝi.

Ne iras sur la eŝafodon:

Nur mortos pro la ironi'.

Li tamen povas en ĉemizo

Promeni hejme kun infan'.

Sed tion ne — eĉ en Parizo —

Sur strat' kun dec' de puritan'.

Sed multe estas tolerata,

Precipe al la petolul'.

Se estas lia ag' regata

De l' grava boneduk-regul'.

Edzinon sian kisi povas

Li en ĉeest' de l' servistin':

Sed se la malon li ekprovas,

De l' boneduko estas fin'.

Li tiam nur amikojn vidas:

Ĉar mondo pri l' petola hom'

Aprobe kaj pardone ridas.

Escepte de l' edzin' en dom'.

En sia oficej' li prenas

La skribistinon sur genu',

Sed kiam ĝi — ne ŝi — ekplenas

De la subuloj, jam ne plu.

Juvelo milfaceta estas  
Bonedukita hom' laŭ ver'.  
Li ne tro brue manifestas,  
Blasfemas nur « je Jupiter'! »

Li diri povas eĉ la veron,  
Sed ne al sia amatin',  
Neniam koni la mizeron,  
Ĉar boneduk' forlasus lin...

Kun la gastigantin' li sprite  
Babilas, grave kun sinjor',  
Kaj manĝas tre bonapetite  
Manĝaĵojn eĉ kun fi-odor'.

Sin pri la naskiĝtag' informi  
De la fraŭlino povas li,  
Sed ne pri ŝia aĝ', nek dormi,  
Kiam pianoludas ŝi.

Se estas li samideano,  
Ne sidas li dum « La Esper' »  
Kaj ne ekstaras kun spontano  
Dum monkolekt', pro malaper'.

Li ne rifuzos la ombrelon,  
Dum la pluvego al konat',  
Sed krome vokos Danielon,  
Se lin li vidas sur la strat'.

Necesas nun, ke li sin tenu  
En mezo, kun la pluvŝirmil',  
Por ke la akvo sole benu  
Amikojn liajn, pro ĝentil'.

Li povas en kafej' vistludi  
Por ĉiu levo po dolar',  
Sed tute ne je l' fin' atuti  
Per kvina aso... pro erar'.

Kaj se honoras lin regale  
Amiko iu per likvor',  
Regalos ree li lojale,  
Heroe ĝis la ferma hor'.

Se mi daŭrigus rimi, vere,  
Ĝis de l' mondfina juĝ' la tag',  
Boileau minacus tre severe,  
Al vi mi estus nur papag'.

#### SENKULPIGO

Mi ĉion « glate, plate » citis,  
Laŭ de Kalocsay la konsil', (\*)  
Laŭ li, simbolojn mi evitis,  
Mi, lia parnasanta fil'.

Hector VERMUYTEN.

(\*) La Arto Poetika — I, v. 65-66.

(El: « La Pirato »)

## Ĉu ursoj sinmortigas?

SVEDAJ ĈASISTOJ KREDAS, KE JES.

*Stockholm...* (Sved-Internacia Gazetservo).

Inter svedaj ĉasistoj sciantaj la kutimojn de la ursoj, kiuj estas sufiĉe multnombraj en norda Svedujo, ekzistas ĝenerala opinio, ke la ursoj preferas sinmortigi ol fariĝi viktimo de ilia malamiko, la homo, kiam ili estas grave vunditaj kaj ne havas ŝancon forkuri de la ĉasisto.

La populara kredo estas, ke la ursoj mortigas sin per dronigo, kaj multaj ĉasistoj, kiuj proksime sekvis la spurojn de vundita urso, trovis, ke la spuroj finiĝas ĉe iu profunda monta lageto, en kiun la urso iris, kaj neniuj postsignoj montris, ke la besto poste forlasis la akvon.

Casisto el Jemtland, kiu partoprenis multajnursoĉasojn, estis petata de korespondanto de stokholma ĵurnalo rakonti siajn opiniojn kaj spertojn pri tiu afero.

Tiu viro rakontas pri urso, kiu paftrafita kaj tre vundita atakis kaj severe gratvundis la ĉasiston, antaŭ ol ĝi fine forkuris, postlasante strion de sango. Tiam dua ĉasisto aperis. Ambaŭ proksime sekvis la urson laŭ la spuroj, kaj iliaj hundoj mordkuris tuj malantaŭ ĝi.

Ili venis al lago inter la montoj ; kaj tie la spuroj finiĝis dum la hundoj tute konfuziĝis, kaj neniu spuro forkondukis de la lago. La ĉasisto estas konvinkita, ke la urso, komprenante ke ĝi ne povas eskapi, tute simple iris en la akvon kaj dronigis sin.

## La Ĉokoladulo

Kiam mi laboris en la diamantfacetojo de la firma « Van Dam » troviĝis inter la facetistoj juna viro, kiu preskaŭ ĉiam manĝis ĉokoladon. Matene, tagmeze kaj vespere li estis manĝanta buterpanon kun ĉokolado. Pro tio oni nomis lin : « la ĉokoladulo ». Ĉiun tagon la aliaj facetistoj ĝojis kaj ridis pri la ĉokoladomanio de la ĉokoladulo. Iun matenon, por ŝerci, demandis unu el liaj kunlaborantoj : « Sed ĉokoladulo, kiom da ĉokolado vi povas manĝi ? » « Ah, tion mi ne scias, sed certe multe ! » respondis la manĝegulo. « Aŭskultu » kriis la submastro, « mi volas veti kun vi, ke vi ne povas manĝi kvindek pecojn da ĉokolado « Boy Scout » « Akceptite ! » respondis la ĉokoladulo. « Kiu perdas, pagos la ĉokoladon kaj dek frankojn, kaj mi manĝos la kvindek pecojn inter la unua kaj la kvina horo ». « Aprobite » respondis la submastro ridante. Dum la posttagmezo la ĉokoladulo manĝis, inter la ridado kaj ŝercado de liaj laboramikoj, la unu pecon post la alia, kaj kiam je la kvina sonoris la laborfino, ĉiuj pecoj estis formanĝitaj. Li do gajnis la veton, tamen nun li estis tiel trosatigita, ke oni devis helpi lin reiri hejmen. Veninte tie, li eĉ ne povis flari la manĝaĵon kiu atendis lin. Al sia edzino li ne kuraĝis diri la veron sed diris ke li estis malsaneta. « Oh ! » ektimetis lia zorgoplena edzino, « iru en la dormoĉambron kaj ripozu iomete ». La ĉokoladulo ne demandis pli, kaj tuj rampis inter la litotukoj. Sed li ne povis dormi, ĉiam li turnis kaj returnis sin, farante ĉion eblan por eviti vomadon. Post duona horo la pordo senbrue malfermiĝis kaj lia edzino aperis. « Ĉu vi fartas jam pli bone, mia karulo », demandis ŝi. « Ne, tute ne », sopirĝemis la ĉokoladulo. « Jen » murmuretis lia servema edzino, « trinku iomete, mi pretigis por vi bonan tason da ĉokolado ! ».

Rerakontis F. VOLDERS.

## Esperantistaj tipoj

---

Ekzistas diversaj homoj en la mondo,  
tial ankaŭ en nia verda rondo  
ekzistas diversaj tipoj  
kun diferencaj principoj.

Kelkiuj sin okupas per poŝtmarkkolektado  
aŭ per senkulpa korespondado.

Ĉu por praktiki Esperanton ?

Ne ! por trovi amanton !

Unuvorte : senkulpec' naiva,  
dolêmotiva !

Sed ekzistas esperantistoj de alia speco  
kun malpli da senkulpeco.

Ili okupas sin per propagando,  
eĉ en eksterlando :

laŭ bezono

ŝanĝas koloron kaj nomon  
kaj lerte eltrompas monon;

kelkiam eĉ okupas sin per prediko

pri mistiko kaj etiko,

sub kiuj sin kaŝas ciniko

kaj erotiko.

Unuvorte : tipoj danĝeraj,

sen dub' degeneraj ...

Pli amuzaj estas tiuj fervoruloj,  
stranguloj,

kiuj anstataŭ propagandi — nur altrudas,

kiuj ofte mem Esperanton nur balbutas,

kiuj havas planojn kuriozajn,

propraopinie grandiozajn.

Unuvorte : oni lasu ilin imagi,

ke sole ili scipovas agi.

Ekzistas ankoraŭ tipoj interesaj,  
strangimpresaj,

ilin, ho ve !

ne gvidas la ide',

sed io pli konkreta,

kaŝe sekreta,

ekzemple ni diru : prezidanta posteno

aŭ iu alia ordeno.

Unuvorte : inspiron donas ambicio,

antaŭen pelas la envio.

Ekzistas ankoraŭ tipoj,  
kiujn prisilenti,  
ne atenti  
estus plej bone.  
Ili sindone  
nur intrigas  
kaj aliajn tion fari instigas.  
Unuvorte : ilin sen timo  
ni honoru per malestimo. —

Ekzistas tiuj diversaj tipoj  
— kun noblaj principoj —  
ne nur en nia lando malgranda,  
sed en la tuta mondo Esperanta  
en kvanto  
sufiĉe granda.

Do — ĉu ne estas stulte kaj kompromite,  
se la esperantistoj opinias sin elito,  
homoj de pli alta kvalito ?  
Unuvorte jam formortas « la interna ideo »,  
inter si batalas la pacarmeo.

Ho, verduloj, verduloj !  
Unue ni kulturu nian propran rondon,  
Nur tiam povos venki ni la tutan mondon.

(Anonima poemo el « Informoj », Estonio, majo).

## Momenton ni ridu

— Ĉu estas vere, profesoro, ke virinoj pli longe vivas ol viroj ?  
— Jes, almenaŭ la vidvinoj.

— Por ni ĉiuj radiostacioj estas aŭdeblaj.  
— Por ni ankaŭ... se ni malfermas la fenestrojn.

— Sed amiko, kiel via vango tiel dikiĝis ?  
— Ho, ĝi estas specimeno de sinjorina manlaboro.

— Via nova romano estas bona. Kie vi trovis la ideon ?  
— La ideon mi trovis en iu filmo, kiu estas farita laŭ mia unua romano.

— Do la boato renversigis kaj tiam li ĉirkaŭprenis vian talion, Anjo ?

— Ne patrino, unue li ĉirkaŭprenis mian talion, kaj poste la boateton renversigis.

— Mia plej granda peko estas mia vanteco. Ĉiumomente mi admiras mian belecon en la spegulo.

— Tio do ne estas peko, ĝi estas nur eraro.

## Bibliografio

(Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitaĵajn ni nur mencias. Verkoj, senditaĵaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

ĈU SOCIALISMO KONSTRUIĜAS EN SOVIETO? (Biblioteko de *Herezulo*) de *E. Lanti* k *M. Ivon*. Formato : 14-21 cm. 52 pĝ. Prezo : 3 fr. plus sendkosto : 0,60 fr. (0,30 por la landoj aliĝantaj al la konvencio pri favora tarifo por libroj). Eldonejo : *Esperanto*, 14, av. de Corbera, Paris (XII). Poŝta ĉekkonto : *E. Adam*, Paris 1330-62. Respondkuponoj estas akceptataj.

Tiu verko estas unika en sia speco : ĝi konsistas el dialogo inter tri personoj : *Futer*, la herezulo, *Ruper*, la ortodoksulo k *Iver*, la objektiva atestanto, kiu vivis dum pluraj jaroj en Sovetio, tie laboris, restante ĉiam en intima kontakto kun la simpla popolo, kaj forlasis la landon antaŭ nelonge. Tiu dialoga formo donas vivon kaj intereson al temo, kiu sen tio estus alirebla nur de fakuloj.

La preso, aranĝo kaj papero estas bonaj; se ni aldonas, ke la broŝuro estas ilustrita, konsidere la malaltan prezon, ĉiu, kiu ial interesiĝas pri Sovetio kaj socialismo, tiu nepre devas posedi tiun vere valoran verkon, plenan je precizaj informoj kaj argumentoj.

## Grupa Vivo

AALST. — « PIONIRO ».

La grupo « Pioniro » resalutas la Flandran Esperantistaron ! Dum pluraj monatoj ne plu aperis raportoj pri nia agado en Fl. Esp. La grupo tiel profunde ekdormis ke dum la estrarkunveno de la 26-6-35 aŭdiĝis pesimista voĉo proponante la likvidon de la grupo. Por decidi pri la sorto de la grupo kelkaj fervoraj grupanoj kunvenis la 17an de julio kaj ĉiuj promesis kunlabori por gvidi la grupon al nova triumfo. Ankaŭ ĉeestis la kunvenon delegitoj el Lede kaj Haaltert. S.ro Leo Calloens skribis al la grupo ke li eksigis kiel prezidanto de Pioniro pro personaj kialoj, estas kun malĝojo ke ni ricevus tiun novaĵon.

Malgraŭ la somera tempo, ni ne libertempos sed regule daŭrigos niajn kunvenojn ĉiumerkrede.

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La 19an de junio, nin vizitis en nia ejo la grupo « SOLIDARECO » el Antwerpen.

Ili regalis nin je parolado pri : La Esperanto Movado inter laboristoj. La parolinto estis ilia Kdo. Karlo Moro, Hungara samideano. La parolado tre plaĉis al ĉiuj, kaj al ĝi sekvis demandoj flanke de la aŭskultantaro. La kunvenon ĉeestis pli ol kvardek gesamideanoj.

Se iam Sano Karlo revenus tien-ĉi, ni tre ŝatus ree aŭdi lin.

La grupo partoprenis la boatekskurson al Vlissingen, organizita de S.ro Lodema, la 7an de julio. Ni renkontis sur la boato, gesamideanojn el Gent, Mechelen, Aerschot, k.a ; estis agrabla tago. Ni bone amuzis. Okaze de la 11a de julio, floroj estas metataj, nome de Flandrema Grupo Esperantista, sur la tombo de Herman Van den Beeck.



## RONSE. — LA PACA STELO.

Le estraro de « La Paca Stelo » iomete ŝanĝiĝis, ĉar S.ro Broodcoorens, nia tre aktiva kaj kapabla kaj ankaŭ tre estimata de ni ĉiuj, forlasis nin por alia profesio, nuntempe en Bruselo. Niaj gratuloj iras rekte al li, ne forgesinte kion li faris por nia grupo.

S.ro Cantaert Jean anstataŭis lin laŭ la rezultato de balotelekto dum la ĝenerala kunveno de la 10a de julio. Al nia nova estrarmembro, ni elkrias ĝoje : Bonvenon ! Inter krampoj dirite, li bonvenis des pli, ĉar ĝis nun li montris per sia regula ĉeesto, ke nia « Kant-art » estas ankaŭ granda laboremulo.

Por la monato de aŭgusto, ni dissendos al ĉiu membro nian monatan programon enhavantan la belan ekskurson al « De Panne » je la 15a de aŭgusto.

Per tiu kunveno ni ekkomencis nian sepjaran ekzistadon kaj ĉiuj, aŭ pli bone, multaj almenaŭ promesis laboradi por pli granda sukceso en nia loka kampo por la ĉiama pli granda progreso de nia verda movado.

Depost nun, oni akceptas novajn elementojn por la kursoj de Esperanto.

Membraĵ gesamideanoj, nun al la laboro, por ke nia 7a jaro 1935-36 iĝu fruktodona jaro.

La « Flandra Esperantisto » ankaŭ esperas ricevi pliajn abonantojn ol pasintan jaron.

Geamikoj — membroj kiuj legas tiujn-ĉi liniojn, pensu ke septembro estas la tutlasta monato, kiu antaŭiras la malfermon de niaj 2 kursoj !!! Ke ĉiu almenaŭ kunportu UNU novan elementon, tiam kaj alie ne, vi plenumos vian promeson, vi faros vian devon.

En tiu-ĉi monato ni ekskursos ankoraŭ al Mont-St. Aubert bicikle, ankaŭ al Oudenaarde kaj tre verŝajne por fermi nian someran sezonon tutlastan piedan ekskurson ankoraŭ decidotan.

Rilate nia laborado, ni kantos kun tiuj de Oudenaarde la 4an de septembro, kaj la 11an, ni daŭrigos nian tradukadon kaj por fini la 18n, ni preparolos inter ni, la lastajn novaĵojn por la remalfermo de la kursoj k. t. p.

La Perfektigaj kursoj iĝas sukceso, ni daŭrigu tiamaniere.

Ankaŭ en la nuna monato, nia ŝparkaso refunkcios ĉar F.ino Geenens promesis ĉeesti kiel eble plej regule.

Ĝis merkredo, Je via sano !!!

## ROESELARE. — RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO.

La 17an de junio ni ĝuis la viziton de samideano S.ro Moy Thomas, la simpatia Londona delegito de U.E.A. Hazarde la vizito okazis kune kun tiu de S.ro G. Debrouwere kaj aliaj Kortrejkaĵ samideanoj. La intencita laborkunveno ŝanĝiĝis aŭtomate pro la gaja voĉo kaj talentplena gitarludado de nia eksterlanda vizitanto. S.ro Moy Thomas laŭdis la tutan ĉeestantaron pro la vere kora akcepto kaj promesis reveni.

La 7an de julio estis organizata tuttaga bicikla ekskurso al Tieghem. Gaja estis la renkonto en Tieghem ĉar la geekskursantoj vojaĝis plejparte bicikle sed ankaŭ aŭtomobile aŭ vagonare. La sunbrilega tago pasis en la kutima gaja amikeco kaj amuzo.

La 8an kaj 11an ni denove renkontiĝis okaze de la flandraj rememorfestoj de 11 julio. Vespere, post la ĝenerala kantdisaŭdigado antaŭ la monumento de A. Rodenbach, ni aranĝis specialan kunvenon en nia kunvenejo Java, kie la stela flago elpendiĝis. Nur la tre malfrua horo devigis nin fini la kunvenon, post kantado de fortsnanta « Flandra Leono ».

Speciale notinda estas la vera bonsukceso de intergrupa renkonto la 4an de aŭg. en Bruĝo en kiu partoprenis multaj gesamideanoj el Bruĝo, Ostendo, Ruselaro (ankaŭ la Kortrejka grupo estis reprezentata).

Antaŭtagmeze ni ĝuis la plezuron de motorboatekskurso tra la Bruĝaj kanaletoj.

Posttagmeze okazis la oficiala kolektiĝo por la bicikla (aŭ trama) ekskurso al Varsenaere. Pli ol 40 ekskursantoj bonvene estis akceptataj ĉe la F.inoj Verhelst, membrinoj de Bruĝa Grupo, kiuj tutspeciale por la okazo ornamis la manĝoĉambron. Farinte agrablan promenadon en la proksimaj arbaroj, ni ĉe la reveno estis invititaj ĉetoble por bonega posttagmezmanĝo. Ĉiuj aranĝoj nepre bonsukcese pasiĝis kaj specialan laŭdon meritas la invitinta familio.

La 18an de aŭgusto okaze de la Flandra pilgrimado al Diksmude nia membraro multege partoprenis.

## Ni Gratulas

Al Gesinjoroj Kamiel Feryn — van Ryckeghem el Lichtervelde pro la naskiĝo de ilia 12a infaneto, fileto Georges, René Yvo.

Al samideano Hector Vermuyten el Antwerpen, kiu gajnis premion de 50 pesetas, disponigitan de la redakcio de « La Pirato » por la ĉiujara konkurso de la « Floraj Ludoj » de la Katalunaj Esperantistoj. S.ro Vermuyten ensendis verson sub la titolo (donita de « La Pirato ») : « Kion bonedukita homo ne devas fari ».

S.inon M. Lodema-van Reeden, la simpatian edzinon de nia redaktoro, kiu la 30an de septembro estos 60 jara.

## Nekrologo

Mortis la 3an de julio, en Ruselare, S.ro René Willaert, patro de nia agema estrarano S.ro Ach. Willaert Sincerajn kondolencojn.

### LETERKESTO

F.ino C. J. H. Apeldoorn, Nederland.

Sendube vi jam ricevis la du unuajn numerojn kaj estonte vi ricevus regule la sekvantajn. Ni ne kulpis pri tio ! Salutojn !

S.ro C. D. Bilzen. Laŭ via letero kaj ensenditaj verkoj vi tre progresadis dum la lastoj monatoj. Tamen, via poemeto ankoraŭ ne estas sen pekoj kontraŭ la gramatiko kaj la stilo. Ni konservas ĝin kaj iam ni ĝin transdonos al kompetentulo por korekti.

---

---

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** Leo Calioens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.  
**Ondervoorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.  
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.  
**Penningmeester:** Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.  
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.  
**Postcheck:** Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50  
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.  
**Lidmaatschap** (met maandblad): 20 fr. per jaar.

### **Aangesloten groepen:**

**Aalst:** « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.

**Aarschot:** « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.

**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.  
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.

**Brugge:** « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.

**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.

**Edegem:** « Nia Idealo », Drie Eikenstraat, 665.

**Hamme:** « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.

**Kortrijk:** « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.

**Lede:** « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede

**Leuven:** « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.

**Lichtervelde:** Sekretariaat, Weststraat, 47.

**Mechelen:** « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek. Wolle markt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.

**Nieuwpoort:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langstraat, 6.

**Oostende:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.

**Oudenaarde:** « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.

**Roeselare:** « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.

**St. Niklaas:** « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

**Alle inlichtingen verstrekken verder te:**

**Diksmuide:** M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.

**Gent:** Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.

**Harelbeke:** A. Doornaert, Stacegemstraat.

**Hoboken:** J. de Groot Caronstraat, 31.

**Maria-Hoorebeke:** Gerard Broodcoorens, Dorp.

**Meenen:** K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.

**Millen (Tongeren):** L. Geukens, Langstraat.

**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.

**Ronse:** « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.

**Thielt:** R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

---

---

OSTENDO

---

# HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

---

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

### KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,  
estas 112 paĝa,  
enhavas ion por ĉies gusto,  
enhavas la plej belajn verkojn el la  
popolkantoj de ĉiuj nacioj,  
estas bele eldonita,  
kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe  
H. v. d. Mast. poŝtkonto : 209.852.  
Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

---

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj  
malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

---

## Varbu Abonantojn !

---

Abonu tuj la monatan gazeton

### “ LA JUNA VIVO ”

Jen vi havas la plej malkaran gazeton por gejunuloj kaj komencantoj. Interesa enhavo, facile komprenebla lingvo; tre taŭga legaĵo por kursoj.

Jarabono : 15 fr.

Petu senpagan specimemon de :

Redakcio de « LA JUNA VIVO »

West-Graafdyk N. H.

Nederland.

---

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.